
KONGRESA KURIERO

# DRAKO DE BRNO

1

2025-07-26

de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno 26 julio – 2 aŭgusto 2025



## Kial Drako de Brno?

En la enireja koridoro de la historia Malnova Urbodomo pendas krokodilo kaj rado, kiuj fariĝis simbolo de la urbo. La radfaristo Birk el la urbo Lednice vetis kun amikoj, ke li dum unu tago (jaro 1638) faligos arbon, faros radon kaj alrulos ĝin al Brno (50 km) antaŭ fermo de la urbaj pordegoj. Li gajnis barelon da vino. La krokodilon donacis al la urbo turka diplomato, sed la popolo kreis legendon, ke en la rivero Svratka ekloĝis drako kaj suferigis la ĉirkaŭaĵon. Iu buĉista lernanto plenigis bovan felon per neestingita kalko kaj metis ĝin sur la bordon. La drako formanĝis la proponitan frandaĵon, revenis en la riveron kaj trinkis. La kalko komencis estingiĝi kaj la besto en doloroj mortis. La nomon *Brněnský drak* (La drako de Brno) portas ankaŭ rapidtrajno inter Prago kaj Brno.

**Kial Brno?**

La kvartaloj *Žabovřesky* (rankvakejo), *Komárov* (kulejo) kaj *Lužánky* (malsekejo) indikas, ke en la regiono abundis koto kaj ŝlimo, en la malnova slava *brn*, de kiu eble devenas la nomo de la urbo. La popola etimologio rakontas, ke kiam venis ĉi tien la antikvaj setlantoj, ili dris: „Brrr!!! No – kion fari, ni ekloĝu.“ La malseka regiono savis monaĥejon en la proksima Rajhrad, kiam imperiestro Jozefo la 2-a volis ĝin nuligi (1781) kaj bredi tie armeajn ĉevalojn, sed la generaloj avertis, ke la ĉevaloj malsanus. La monaĥejo ne nur restis, sed eĉ ricevis librokolektojn el nuligitaj monaĥejoj de la tuta Moravio kaj fariĝis Monumento de Moravia Literaturo.

En aliaj lingvoj la urbo estas konata sub diferencaj nomoj: germane *Brünn*, latine *Bruna*, jide *Brin*, albane *Bërno*. Ĉar la fonetika sistemo de Esperanto ne havas silaboforman R, ne eblas el la ĉeĥa Brno krei esperantlingvajn derivaĵojn (Brna, Brnanoj). La formoj *Brno*-a, *Brno*-anoj ŝajnas mallertaj kaj pezaj. Tial de tempo al tempo aperas eksperimentoj esperantigi la nomon.

Karel Píč en la romano *Litomiŝla tombejo* uzis formon *Bruno*, Zdeněk Hršel kaj Jan Werner tradukis en la jaro 2007 faldfolion *Brno – ĝusta direkto* kaj en la teksto aplikis formon *Brunno*.

Akademianino Ruth Kevess-Cohen en sia artikolo *Kial Burno?* klarigas: „La Akademianoj konsideris formojn kun aliaj vokaloj, ekz. *Barno*, *Berno*, *Birno*, *Borno* kaj *Burno*. *Berno* jam estas Esperanta nomo de la svisa urbo Bern, do ne taŭgas por Brno. Oni konsideris *Bruno*, sed ĝi estas ofta vira nomo, kaj bruno estas koloro. *Burno* ne havas tiajn malavantaĝojn, kaj ĝia elparolo sufiĉe similas al la nacilingva elparolo de *Brno*. Tial finfine la rekomendo de la Akademio estis *Burno*.“

Malgraŭ tio ĉeĥoj persistas ĉe la nomo Brno, ĉar Burno ne estas ilia urbo.

**Salono Höger**

troviĝas en la sama konstruaĵo kiel **salono Zamenhof**, sed en malpli granda ejo.

# Mallonga gvidilo al ĉeĥa kulturo

Duncan Charters

1. **Lingvo**. Respekto al la ĉeĥa lingvo estas ŝatata, do se vi provas saluti kaj danki en la ĉeĥa, tio povos helpi en viaj kontaktoj. Jen la kutimaj ĉiutagaj frazoj en la ĉeĥa kun proksimuma Esperantlingva prononco:
– Saluton, bonan tagon: Dobrý den (**Do**-bri-den). Konsilinda komenca saluto dum la tago.
– Pardonu min: Promiňte (**Pro**-min-te)
– Ĉu vi parolas... [Esperanton]: Mluvíte [esperantem] (**Mlu**-vi-te... **es**-pe-ran-tem?)
– Mi petas: Prosím (**Pro**-sim)
– Dankon: Děkuji (**Dje**-ku-ji)
– Ĝis la revido: Na shledanou (Prago: **Na**-sĥle-da-noŭ / Brno: **Na** zhle-da-noŭ)
– Mi amas vian landon: Miluji vaši zemi (**Mi**-lu-ji **va**-ŝi **ze**-mi)
2. **Kontakto.** Tio povas ŝajni pli formala ol en aliaj konataj kulturoj, do atentu la jenon:
– Manpremoj estas normalaj, sed ne proksima korpa kontakto kun nekonatoj.
– Lasu personan spacon, plej ĝentile almenaŭ duonmetron por persona interparolado.
– Kiam oni interparolas, regula okulkontakto estas normala, kaj fiksaj rigardoj ne surprizu.
– Se oni fikse rigardas vin, probable vi ne aspektas ĉeĥa: rideto kutime ĉesigas atenton.
– Kolera, ofendita rigardo povas indiki ke vi malatentis kutiman ĝentilecon.
– Ne tro ridetu, aparte ne al nekonatoj, sed rideto estas ĝentila se oni faras servon al vi.
3. **Konversacio.** Ĉeĥoj estas bone edukitaj, do atentu tion respekti:
– Multaj volonte kaj senĝene diskutas kun intereso pri mondaferoj post konatiĝo.
– Ĉeĥoj devis kutimiĝi al pli da turismo, sed ĝojas ĉar ili estas fieraj pri sia kulturo.
– Oni aprezos vian intereson se vi aludas specife al la ĉeĥa kulturo aŭ demandas pri ĝi.
– Kiel en multaj kulturoj, ne bonvenas eksteraj kritikoj eĉ se tion iniciatas ĉeĥoj mem.
4. **Teknologio kaj servoj.** Ĉeĥoj estas ĝisdataj:
– Poŝtelefonoj estas preskaŭ universalaj, kaj ankaŭ vifio por retkonektado.
– Se vi bezonas SIM-karton, O2, T-Mobile kaj Vodafone estas la plej uzataj servoj.
– En lokoj provizantaj servojn (ekz. poŝtoficejoj) atentu ke giĉetoj povas esti servospecifaj.

## Eraro en la papera versio de la Kongresa Libro

Sur la paĝo 24 troviĝas **Laŭtaga programo** kun erara dato **Sabato la 27-a de julio** kaj ankaŭ la sekvaj tagoj havas ŝovitan daton je unu tago. En la tabela programo (paĝo 32) ĝi jam estas en ordo, same reta versio estis korektita. Kiam oni rimarkis la eraron, la presejo havis la libron presita.

## Movada foiro

Sabate la 26-an de julio en la korto Cink okazos Movada Foiro (18h30-20h30), en kiu Esperanto-asocioj kaj institucioj povos prezenti sian laboron al la kongresanoj. Verŝajne la plej granda intereso estos pri la Aŭstria tablo, kiu propagandos Universalan Kongreson 2026 en la urbo Graz.

## Busoj al Nacia Vespero pli frue!

Dimanĉe la busoj al Nacia Vespero forveturos jam je la 17h30,. La busoj veturos trifoje po tridek minutoj de antaŭ la elirejo apud konstruaĵo Q.



# Salutletero de Jan Grolich

Estimataj esperantistoj kaj vizitantoj de la kongreso,

mi ĝojas, ke en nia sudmoravia metropolo kunvenis mil cent adeptoj de Esperanto el la tuta mondo.

Esperanto, lingvo kreita kun la ideo de internacia kompreniĝo kaj kunlaboro, kiu povas esti lernita relative rapide, pruvas, ke komunikado sen baroj povas funkcii. Ja nur en Ĉeĥio parolas tiun ĉi plej disvastigitan artefaritan lingvon centoj da entuziasmuloj.

Mi ĝojas, ke ĝuste Brno gastigas tian gravan eventon, kiu kontribuas al plifortigo de reciproka amikeco inter popoloj. Mi esperas, ke dum la kongreso vi ĝuos ne nur fakajn prelegojn kaj renkontiĝojn, sed ankaŭ ion el nia ĉeĥa kulturo kaj gastamo. Ne forgesu gustumi lokajn specialaĵojn kaj ĝui la amikecan atmosferon, kiun Suda Moravio proponas.

Jan Grolich
estro de la Sudmoravia regiono

**Tomáš Břicháček**, prezidanto de la Praga Esperanto-klubo, prezentis la kongreson en Ĉeĥa Televido dimanĉe la 20-an de julio 2025 je la 16h30. Spektebla en la reta elsendado de Ĉeĥa Telvido ekde la 28-a minuto 42 sekundoj.



https://mallonge.net/ct2025

**Libroservo** malfermiĝas sabate la 26-an de julio 2025 je la 14h00 kaj fermiĝos je la 17h30.

# Aŭspicio de Martin Bareš

Rektoro de la Masaryk-Universitato Martin Bareš aljuĝas aŭspicion al la

**110-a Universala Kongreso de Esperanto,**

kiu okazos de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2025 en Brno.

Volonte mi akceptas aŭspicion super tiu evento kaj al la organizantoj kaj ĉiuj partoprenantoj mi deziras ĝian sukcesan realigon.

Martin Bareš,
rektoro de la Masaryk-Univestitato,
la 17-an de julio 2025



Preparado de la kongreso:
plenigado de kongresaj sakoj

Atendas vin libroj novaj kaj malnovaj, klasikaj kaj ankaŭ brokantaĵoj, beletraj kaj fakaj.

## Lastmomentaj aliĝintoj

1070 **S-rino Vasilina Ralko**, unua.kanalo@gmail.com, Belorusio
1071 **S-ro Siniša Dvornik**, sinisadvornik@yahoo.com, Kroatio
1072 **S-ro S-ro Wang Hanping**, P.O. Kesto 77, 100037 Beijing, Ĉinio
1073 **Prof. Chen Ji**, 13693326472@163.com, P.O. Kesto 825, 100037 Beijing, Ĉinio
1074 **S-ro S-ro Jiang Limin**, Ĉina Esperanto-Ligo, N-ro 24-a, Baiwanzhwang, Xicheng, 100032 Beijing, Ĉinio
1075 **Doktoro Jie Qu**, N-ro 24. Baiwanzhuang, Xicheng, Beijing, Ĉinio, 100045 Beijing, Ĉinio
1076 **S-ino Francisca de Oliveira Calegari**, francalegari@yahoo.com.br, Brazilo
1077 **S-ro Timm Penno**, timm.penno@esperanto.email, Germanio
1078 **S-ro Linus Penno**, Germanio
1079 **S-ino Sonia Daubercies-Chatelan**, daubercies@bluewin.ch, Svislando
1080 **S-rino Angelina Casadei**, angelina.casadei@bluewin.ch, Svislando
1081 **S-ro Arnold Dávid**, Slovakio
1082 **D-ro Alejandro Fermin Lopez de Vergara Mendez**, aflopez@ull.edu.es, Hispanio
1083 **S-ro Matej Grochal**, matej.grochal@gmail.com, Ĉeĥio
1084 **S-ino Elisabeth Barbay**, eliz.barbay@wanadoo.fr, Francio
1085 **S-ino Lucie Hulot**, mamilu1@free.fr, Francio
1086 **S-ro Román Ralko**, Belorusio
1087 **S-ino Ada Florence Iracadukunda**, iadaflorence@gmail.com, Burundo
1088 **S-ro Petr Miňovský**, p.minovsky@seznam.cz, Ĉeĥio
1089 **S-rino Zuzana Bednaříková**, ales.bednarik@seznam.cz, Preslova 52, 602 00 Brno, Ĉeĥio
1090 **S-ino Sylvie Roques**, Francio
1091 **S-ino Liu Jun**, Svislando
1092 **S-ro Michal Matúšov**, Slovakio
1094 **S-ro Dominique Martin**, Francio
1095 **S-rino Monika Handzlik**, monika@reklamadab.pl, Pollando
1096 **S-ro Kuba Abrahamowicz**, Pollando
1097 **S-rino Angeline Biot**, angeline.biot@outlook.fr, Francio
1098 **S-ro Albert Braun**, Svislando
1099 **Marek Michalovič**, Slovakio
1100 **S-ro Dávid Krupa**, Slovakio
1101 **Magistro Bohumil Bouzek**, bohumil.bouzek@gmail.com, Zelinářská 601/22, 147 00 Praha, Ĉeĥio
1103 **S-ro Anthony Burger**, anthonyalexanderburger@gmail.com, Ĉeĥio

# Ekskursoj ankoraŭ liberaj

**E2. Valtice – 84 €** marde

Kastelo kaj vinkelo de Château Valtice

**E4. Kroměříž – 64 €** vendrede

Kastelo kaj florĝardeno

**E5. Velehrad + Modrá – 92 €** ĵaŭde

Baziliko kaj subĉiela muzeo

**E6. Slavkov – 62 €** marde

Batalo de tri imperiestroj

**D2. Vilao Tugendhat – 25 €**
ĵaŭde kaj vendrede

**D8. Stelobservejo – 20 €**
merkrede 19h00-22h15

**Redaktoro:**
Miroslav Malovec
Sendu viajn kontribuojn al
drako@esperanto.cz

**Provleganto:**
Marek Blahuš